## Redakcia noto

### 100-jara datreveno de *Ivo Lapenna*

En tiu ĉi jaro ni havas rondan datrevenon eĉ de du elstaraj figuroj de la historio de Esperanto. Unu el ili estas la 150-jara jubileo de *Ludoviko Zamenhof*, la alia estas la 100-jara datreveno de la naskiĝo de *d-ro Ivo Lapenna,* konstruinto de la niaepoka Esperanto-movado, la "heroo de Montevideo". *Lapenna* estis longtempa gvidanto de Universala Esperanto-Asocio, kaj havas neforgeseblan meriton pro atingo de la internacia rekono de Esperanto ĉe la asembleo de UNESKO en 1954, en Montevideo.

*Ivo Lapenna* naskiĝis en *Split* (Dalmatio, Jugoslavio) la 5-an de novembro 1909 en malnova dalmata, aristokrata familio. Lia vivo estis plene kunligita kun la Esperanto-ideo kaj Esperanto-movado. Li ellernis Esperanton kiel memlernanto en 1928. Li estis kunfondinto de Studenta Esperanto-Klubo (poste Akademia Esperanto-Klubo) en la Universitato de *Zagreb* en 1929, kaj ĝia prezidanto ĝis aprilo 1941; fondinto de Studenta Tutmonda Esperanto-Ligo (STELO) dum la UK en Budapeŝto en 1929, kaj ĝia prezidanto ĝis la komenciĝo de la Dua Mondmilito; prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo de 1937-1950; komitatano kaj estrarano de IEL (ekde 1947 UEA) de 1938-1974; ĝenerala sekretario de UEA de 1955-1964; prezidanto de UEA de 1964-1974; fondinto de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ) en 1957 kaj ekde tiam ĝia prezidanto, iniciatinto kaj dum pluraj jaroj redaktoro de ĝia organo "Internacia Jura Revuo", membro de la Akademio de Esperanto ekde 1952, kunfondinto de Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ICNEM) en 1980, ekde tiam ĝia prezidanto, membro de la redakta komitato de "Horizonto" kaj ĝia ĉefa kunlaboranto.

Post lia forpaso la 15-an de decembro en 1987 en Kopenhago, honore al lia agado estis starigitaj du instancoj: "Internacia Scienca Instituto *Ivo Lapenna*" kaj "Fondaĵo *Ivo Lapenna*" – kiuj nun instigas ĉiujn Esperanto-organizaĵojn, klubojn kaj individuojn ĉie en la mondo celebri la du gigantojn per multaj ekspozicioj, prelegoj kaj artikoloj en la gazetaro pri ilia enorma, eminenta kaj elstara laboro por la Internacia Lingvo, Esperanto.

Ampleksa materialo pri lia agado, viv-prezento, verkoj, rezultoj, artikoloj, paroladoj ktp. estas kolektita en aparta retejo:

*http://www.ivolapenna.org*



# Ekonomia Esperanto

*Hans B. Welling*

### Kiom facila estas Esperanto?

Esperanto estas tre facila lingvo, tion ni ĉiuj scias. Sed kiom facila? Rare oni aŭdas precizajn ciferojn. Kion vi persone opinias?

El "Esperanto" per *Google* rezultis:

| serĉvortoj | respondoj anglalingvaj | respondoj germanlingvaj |
|---|---|---|
| Esperanto facila | 1 840 000 | 123 000 |
| Esperanto facila faktoro | 212 000 | 9 500 |

Inter tiuj respondoj la kapvorto "faktoro" plej ofte, de pli ol 95%, ne temas pri la demando, kiom pli facila estas Esperanto ol naciaj lingvoj.

Kelkaj trovitaj respondoj pri la facileco:

tre facila
relative facila
kvar oble pli facila
kvin oble pli facila
ĝis dek oble pli facila
"ĉielolarĝa diferenco".

Relative detala dokumento de *Corsetti*[1] rilatas al la facileco tiel:

1. "*... question remaining today is how easy Esperanto is to learn*" (... restas nuntempe la demando, kiom facile estas lerni Esperanton),
2. "*... is, relatively, a very easy language*" (estas relative tre facila lingvo).

Li ne donas ciferon, ne donas faktoron.

---

[1] http://springboard2languages.org/documents/springboard_rationale.pdf